

STARTO

N-ro 2/2026 (299)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Sabla Printempo en la Urba Biblioteko Písek
seminario pri la Esperanta literaturo
en la 21-a jarcento

La 11-an de aprilo 2026

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 400 Kč (Starto elektronike 290 Kč), B 300 Kč (elektronike 190 Kč), C 150 Kč, P 200 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1700 Kč, rete: 900 Kč, rete por ĈEA-anoj: 500 Kč; Marček: 1900 Kč, rete: 1100 Kč, rete por ĈEA-anoj: 700 Kč, Cink por progresintoj 2950 Kč, rete: 1400 Kč, rete por ĈEA-anoj: 1100 Kč.

Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: blindula, ILEI, katolika, kristana, grupo por ciferecigado, (memstariĝis: handikapitoj kaj fervojistoj)

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Reteja grupo: redakce@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ĈES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ĈES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, DiS, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ĈES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.ch@seznam.cz (kluby a sekce, konference, jubilej, granty)

Člen výboru: Mgr. Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (web, online komunikace a nástroje)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio (+ ILEI):

Milan Kolka, Bučovická 939/12
627000 Brno, tel. 608 421 404,
cefdelegito@esperanto.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admi-
stras: Milan Kolka.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy,
muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

KONFERENCO DE ĈEA EN PODĚBRADY

Ĉi-jara konferenco de ĈEA okazos en ĉarma bohemia urbo Poděbrady de la 25-a ĝis 27-a de septembro 2026. Eblas resti ĝis lundo la 28-a de septembro, kiam estas la tutŝtata festo Tago de Ĉeĥa Ŝtateco.

La konferenco efektiviĝos en Mezlernejo de Agrikulturo, kiu situas en la strato [Boučkova 355/49](#). La lernejo estas bone atingebla piede de la stacidomo de Poděbrady – sufiĉe komforta, ebena vojo, kiu longas ĉirkaŭ 800 metrojn.



La tuta programo – ejo por traktado de la konferenco, loĝoĉambroj kaj manĝejo situas en du najbaraj konstruaĵoj de la mezlernejo ligitaj per koridoro. Bedaŭrinde ne estas lifto en la domoj.

Informojn pri prezoj de restado, loĝigo kaj manĝado vi trovos en aligilo por la konferenco en retejo www.esperanto.cz.

Venu kaj ĝuu [komunan renkontiĝon](#) kun viaj geamikoj, traktadon de anara konferenco kun gravaj informoj, ekkonon de bela urbo, promenante ĝin, buntan vesperan programon.

POZVÁNKA NA ĈLENSKOU SCHŪZI ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s.,

která se koná v přednáškovém sále
Střední zemědělské školy
Poděbrady, Boučkova 355/49

dne 26.9.2026 od 9 hodin.

Program:

1. Zahájení, přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatele zápisu)
2. Zpráva o činnosti ČES a jeho organizačních složek
3. Zpráva o hospodaření ČES
4. Diskuze ke zprávám
5. Různé
6. Usnesení
7. Závěr



La agrikultura mezlernejo kaj ĝiaj ĉambroj, en kiuj ni loĝos, manĝos kaj traktos.

Pri Poděbrady

La urbo kun 15 mil loĝantoj kuŝas 50 km oriente de Prago. La reĝo Přemysl Otakar la 2-a konstruigis ĉi tie en la jaroj 1262-1268 ŝtonan burĝon, kiu en postaj jarcentoj estis alikonstruita je kastelo. En ĝi en la jaro 1420 naskiĝis Georgo el Poděbrady, kiu en la jaro 1458 estis elektita kiel ĉeĥa reĝo.



En la jaro 1905 estis en la kastela korto borita mineralakva fonto kaj ekde la jaro 1908 Poděbrady servas al pacientoj kiel banurbo. Ekde la jaro 1926 ĝi specialiĝas al kuracado de kor- kaj angio-malsanoj.

La nomo Poděbrady onidire signifas Perdis-barbon, ĉar la urbanoj sin razis, kio en la mezepoko estis nekutima.

Ĉe la placo de Georgo el Poděbrady troviĝas domo, kie vivis onklo de la verkisto Franz Kafka, kiu lin vizitadis por ripozi de laciga laboro.

En la urbo ankaŭ ofte restadis kaj verkis poeto S. K. Neumann (kunfondinto de la Praga E-klubo). Memortabulon havas grava pomologo Matěj Rössler (sur katolika paroĥejo) kaj judoj, kiuj ne revenis el koncentrejo (sur la loko de iama sinagogo).

Esperanto en Poděbrady

En la urbo vivis konataj esperantistoj František Pytloun, Josef Chvosta kaj Ladislav Fiala. Ĝis nun tie vivas Pavel Polnický, iama asocia sekretario (inter la jaroj 2004 – 2008 lia adreso estis ankaŭ adreso de la asocio).

En Poděbrady okazis la asociaj konferencoj jam en la jaroj 2001 kaj 2010, en la jaro 2011 gastis tie KELI-kongreso kaj en 2018 kongreso ekumena (KELI kaj IKUE).

La loka Esperanto-klubo estis fondita en 1911, sed ĝi plurfoje estingiĝis kaj refondiĝis. Ekde 1960 la klubanoj aranĝadis renkontiĝojn en Poděbrady, plurfoje ligitaj kun ŝakturniroj, kaj kunvenojn por finintoj de korespondaj kursoj. En la urbo troviĝas eĉ *Alej Esperanto* (foto el la jaro 2010).

mm



OTAKAR THEER
HOMO, KIU SERĈAS ABSOLUTON
tradukis Stanislav Kamarýt (1883 – 1956)

Mi rememoras mian infanecon kun la timego de tiu, kies rememoroj parolas pri teruro kaj torturo. Mi vidas mian patron en la blua-ruĝa uniformo de ulana majoro, altan; mire ke li trairas la pordon, kun lipharoj kvazaŭ jatagano, kun lipharoj, kiuj stariĝadis dum atako de kolero. Li estis malofte hejme; sed kiam li venis, mi ne scias kial; la silento de niaj ĉambroj iĝis ankoraŭ pli mallaŭta, la malĝojo de nia domo ankoraŭ pli malgaja. Kaj en tiu mallaŭto kaj soleco, sonore, preskaŭ trudite, bruis lia rido kaj liaj spronoj, kiuj sonorilis en la tuta domo.

Li volis, ke ni, mi kaj la patrino, akceptu lin kun rido, kiel la oficiraj kazinoj, kiujn li scipovis amuzi dum la tuta nokto. Sed ni ambaŭ fuĝis, tuj kiam lia sabro ektintis sur la ŝtuparo; la eta patrino staturo, kvazaŭ eterne ensorĉita en funebnan veston, sur kiu ĝis la kalkanoj susuris rozario, ŝanceliĝis kvazaŭ ombro en sian ĉambreton. Kaj mi fuĝis en la malantaŭajn ĉambrojn, en la subtegmenton, aŭ en la kuirejon (ĉar mi ne rajtis sur la straton) kaj mi aŭskultadis malespere, kiam ĉesos soni la patra rido.

Mi havis frenezan, senbridan timon pro tiu rido. Ĉar mi aŭdis ĝin jubili en miaj unuaj rememoroj, jubili pro mia doloro. Mi memoras kvazaŭ hodiaŭ: mi kuŝis en liteto, lampo brulis kaj la vartistino rakontis al mi per dorma voĉo fabelon. . . Poste venis la patro, fumis pipon kaj krak-batis per kan-vergo la tibiingojn de siaj faldbotoj. La vartistino stariĝis antaŭ

li kvazaŭ soldato, salutis soldatmaniere, kaj donis pri mi raporton, kion mi faris kaj kiel mi kondukis. La patro estis kontenta. Poste li klinis sin super mi kaj diris: »Jen, etulo, pruvu, ke ci estas viro!« Ekmalbonodoris sur miaj lipoj la piptubo, kiun la patro enigadis en mian buŝon. Mi forturnis min kaj kunfermis la dentojn.

Li trudis ĝin al mi ree, kaj mi ree rifuzis. Tiam li altiĝis kvazaŭ fantomo: la soldataj medaloj ŝprucis en flamoj sur lia brusto, la okuloj kvazaŭ volis elsalti el la kapo kaj sub la hirtiĝintaj lipharoj kriegis lia giganta buŝo: »Vi fumos, jes, jes, jes fumos! . . .« La vipbato de la kanvergo trais mian tutan korpon; kaj poste alia sur la manojn, alia sur la vizaĝon, unu-du, kiel frapis lia malsaĝa mano, trudpense, senmedite. Fine mi prenis la pipon en la buŝon. »Ankoraŭ... ankoraŭ. . .« elĵetadis liaj lipoj. Mi glutadis la fumon kun larmoj; estis svene al mi. Kaj super mia eta korpo, baraktanta en spasma dolora, ridis la patro sonore, gaje, triumfe. De tiu tempo mi lin evitadis pro instinkto kiel besto, al kiu oni misfaris. Kaj li torturadis min denove pro nenio, senkonscia pro furiozo, ke mi ne karesas lin, ke mi ne ridetas al li. Ĝi impresis al mi, kvazaŭ li venĝus pro la silentado de niaj ĉambroj: kvazaŭ li volus aŭdi en ili ploron kaj petojn, kiam rido maldevis tie jubili. Sed mi, hardita pro kutimo, lasis lin furiozi sen eta sono kaj sen ekkrio: tiam resonis en la ĉambro sole la eĥo de batoj falantaj sur mian korpon.

Se li trafis la patrinon hejme, mia martirigado estis des pli akra. Ŝi forveturis antaŭ ĉia dolora punado en preĝejon por preĝi; ŝi ne eltenis la bruon de batado: kaj tiamaniere plilongiĝis la atendado je mia turmentado, ĝis kiam ŝia kaleŝo forruliĝis.

Kaj tamen ŝi neniam pledis por mi nek kompatis min. Kiam ŝi revenis kaj mi estis kuŝanta kun batita korpo kaj ĉirkaŭbandaĝita kapo, ŝi venis kaj flustris mallaŭte kaj sen emocio: »Neesplorableblas estas la vojoj de Dio!« Ŝiaj bluaj okuloj, eliĝintaj, gigantaj, okuloj profetinaj, min verŝajne eĉ ne vidis: ili estis kvazaŭ plenigitaj de eterneco. .

Sen la scio de la patro vizitadis la patrinon konfesprenanto. Li estis kvindekjarulo, granda, kun nigraj okulvitroj, kiu enigis sin en la ĉambron kvazaŭ silento. Iam kaj iam li ruĝiĝis sur la vizaĝo. Tiam lia vizaĝkoloro mirinde reflektiĝis de la peruko, griza, brilanta ie en dubeverdaj nuancoj.

Ankaŭ tiu ne subtenis min. Kiam la kontuzoj sur mi estis tro rekoneblaj, li diradis, ke nia „rekompenco de humilulo estas senmezura en la ĉielo“. Li parolis kun tremeta voĉo kaj volis, ke mi daŭre preĝu por la patro. Li rakontis al mi pri peko kaj punoj, li bruligadis antaŭ mi la fajron de la purgatorio kaj la fajran ardon de la sep inferaj zonoj. Iam li senvestigis min kaj frapis mian korpon per malgranda skurĝo, poste li forviŝis la sangon de miaj vundoj kaj nomis min »Oferito Dia«. Post lia foriro mi restis ŝtoniĝinta kaj mi preĝis malespere, por ke oni min akceptu en la ĉielo.

Kaj tiel mi amis neniun, nek la patron, nek la patrinon, nek lin.

Poste eĉ preĝi mi dekutimiĝis. Krom miaj tri torturantoj, mi konis neniun. Agi mi timis. En liberaj momentoj estis por mi plezuro revii, revii sen celo pri du aferoj eterne monotone la samaj; dum la ĉeesto de la patro mi revis pri la vivo de preĝoj, religia teruro kaj asketeco; kiam estis ĉe mi la ceteraj du, mi revis pri bataloj, bleko de milittrumpetoj, dragonaj atakoj, dueloj kaj militparadoj - kiel al mi iam rakontis la patrino pri la patro.

Tio pelegis min de la unuaj revoj al la duaj, sen ĉeso, sen korpardono, regule kiel horloĝo, kvazaŭ du Voloj ĵetadus inter si mian kranion en vanta ludo. Mi povis neniam halti, nenie ekteni, mi fumadis tiujn halucinaciigajn opiajn cigaredojn de sonĝoj senĉese, preskaŭ en senkonscio.

Kiam ili donis min en gimnazion, tio estis por mi ankoraŭ pli malbona. La patro fariĝis pli obstina, la pastro pli minaca. Mi ne sukcesadis. La patron, kiu volis havi min granda kaj blonda, incitis nun ĉio sur mi: mia delikata blonda estaĵo, la mallaŭta eĥo de miaj vortoj, eĉ ia nostalgia revo de miaj okuloj. Laŭkutime li komencis jam matene: li fortiris min en la banĉambron, trudis al mi, ke mi submergu min en la glacian akvon kaj, kiam mi rezistis, aperis al mi la patro, kiel lin desegnis miaj infanaj rememoroj: li ĵetis min en la ondojn kaj vipadis mian korpon per la frosta rimeno de la duŝo. La pastro venis malpli ofte, li ne skurĝis min, sed liaj vortoj estis pli minacaj. En la infero, pri kiu li nun parolis, krevis korpoj pekulaj kaj ree iĝis tutaj por novaj turmentoj, la homoj tie samtempe frostis kaj brulis, la okuloj estis eligataj, ungoj ŝirataj.

Li jam ne parolis per voĉo tremeta: liaj vortoj batis alarme, kanonis, deliris, siblis kvazaŭ en ili krakus sulfuro kaj fajro. Kaj la patrino aŭskultis lin kun la rozario ĉirkaŭvolvita sur la manplatoj, kun okuloj, kiuj aperis kvazaŭ vidantaj tronon Dian. . .

Kiam mi estis dekokjara, oni foje dum la nokto alveturigis la patron mortan. Kaj kelkajn tagojn poste, ankaŭ pro apopleksio, mortis mia patrino.

Mi estis nedependa, riĉa, kun kuratoro, kiu ne zorgis pri mi.

Post la enterigo, kelkfoje, venis la pastro. Lia voĉo tondris ree super mia kapo, sed kiam mi aŭskultis lin indifere, li turnis kaj per ploraj vortoj petetis pri kotizo por religia kongregacio. Pli pro enuo ol pro kolero, mi montris al li la pordon.

Tiel malaperis miaj tri torturantoj, kaj mi sopiris je neniu. Komence mi vivis hejme. Kaj la terura ludo de la du Voloj komenciĝis denove, vipe pelante min de sensacoj al sensacoj, de revoj pri vivo al revoj pri senvivigo. Konfuzita, malespera pro doloro, mi serĉadis fremdajn vizaĝojn kaj fremdajn historiojn. Mi vivis en kluboj kaj ludejoj, mi partoprenis en bankedoj, kie oni post la noktomezo disbatas pokalojn, spegulojn kaj lustrojn. Mi estis ĉe dueloj kaj en strataj tumultoj mi serĉadis aventuron de morto. Kaj mi revenadis poste al mi, ankoraŭ pli soifanta, ankoraŭ pli nepersistema. Eble tial, ĉar mi ekkonis la malfirmecon de mia Mi, tiun eternan vivon kvazaŭ sur ondoj, unu fojon en la alto, poste sendita en abismon, mi volis meti ankron en io ekster mi, en io absoluta, en io bela kaj mirinda, kiel mia animo estas bela kaj mirinda.

Ĝi estis tio, kio min tiris al la virinoj.

Kaj mi havis feliĉon, feliĉon, se tiu ĉi vorto validas por homo kiel mi: amis min vendistinoj el butikoj kaj majestaj sinjorinoj kun surpentritaj ungoj. Mi konis virinojn-florojn, kiuj brodas ĉielajn liliojn per manoj odorantaj de rezedo, kaj la aliajn, kiuj frapetas, dum ekmateniĝas, sur pordojn hotelajn, ĉe flanko de amanto. Iujn mi forlasis sen tuŝeto kaj iujn post momento de volupto: ĉar la sekreto de unuj estis malardo; kaj de la aliaj, fajro. Mi malfermis iliajn animojn kvazaŭ ĉambrojn: kaj kiam aperis al mi iliaj unukoloraj muroj, mi forĵetis la ŝlosilojn kaj mi fuĝis al mi mem.

Nun nur mi vidas la tutan sencelon de mia malespero; mi estas alia ol la ceteraj, du voĉoj parolas en mi, duopa sopiro ludas per mia koro. Mi vekigis kiel epilepsiulo, kiu scias pri alvenanta spasma: tiel mi timegas tiun vantajn ĉirkaŭiron, poreterne bruligitan de la duopa volo en mia animo.

Kaj se io restis en mia vipita, turmentita korpo, tio estas: mi volus forgesi mian malĝojon, mian angoron, mian malesperon en la vizaĝkoloro de virino, - de virino, kiu eble ne estas el tiu ĉi mondo. Ĉar kie mi trovos estaĵon, kiu estas samtempe fajro kaj glacio, samtempe vero kaj mensogo, samtempe doloro kaj samtempe volupto korpa kiel mia animo?

* * *

Stanislav Kamarýt estis ankaŭ bona tradukanto de beletro. Ni prezentas lian tradukon el Ĉeĥoslovaka Antologio (1935) por rememori lian forpason antaŭ 70 jaroj.

Výsledek hospodaření ČES za rok 2025, plán na rok 2026
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).

Příjmy	pl.2025	sk.2025	pl.2026	
Příspěvky na běžný rok	11 000	10 420	12 000	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2025 peněžní prostředky pokladna korunová 0 účet Fio 6 761 účet Fio spořicí 696 731 peníze celkem 703 492 <i>změna vůči 31.12.2024 104 436</i> investice podílové listy 188 420 investice celkem 188 420 <i>změna vůči 31.12.2024 13 735</i> pohledávky UK 2025 k vypořádání s UEA 1 091 878 UEA faktura 5 960 Kosmas 260 pohledávky celkem 1 098 098 <i>změna vůči 31.12.2024 1 097 058</i> ostatní majetek ČES drobný majetek v ceně pořízení 247 667 knihy v libroservu (inventura) 296 544 ostatní majetek ČES celkem 544 211 <i>změna vůči 31.12.2024 197 674</i> závazky UEA subkonto 1 152 257 platby pro UEA 77 917 závazky ke členům 10 000 závazky celkem 1 240 174 <i>změna vůči 31.12.2024 1 196 378</i> účelově vázané prostředky fond Tilio 27 392 fond Cigno 21 388 sekce nevidomých 20 904 klub Mladá Boleslav 16 618 fond ediční 12 660 klub Ratíškovice 8 246 pedagogická komise 6 603 klub Havířov 3 052 klub Písek 2 673 klub Česká Lípa 2 215 klub Benešov 1 557 klub Přerov 1 366 klub Karlovy Vary 1 337 klub Tábor 1 314 klub Opava 1 079 klub Vítkovice 992 klub Šumperk 641 klub Hranice 624 klub Ústí nad Labem 542 celkem 131 203 <i>změna vůči 31.12.2024 940</i>
Příspěvky dobrovolné		1 000		
Příspěvky na budoucí rok	14 000	19 580	17 000	
Dary členů	15 000	26 510	10 000	
Dary nečlenů		11 300		
Dotace		300 000		
Předplatné časopisů		3 823		
Konference a sjezdy	85 000	102 888	80 000	
Prodej Kosmas		4 680		
Muzeum		0		
Libroservo	15 000	120 041	6 000	
Kurzy esperanta	5 000	3 460	2 000	
Příspěvky UEA ind. běžný rok		3 579		
Příspěvky UEA ind. bud. rok		17 828		
Platby UK na běžný rok		152 143		
Platby UK na budoucí rok		57 129		
Platby ILEI a pedagog. komise		600		
Úroky z účtů	17 000	15 205	5 000	
Půjčka		115 000	0	
UK 2025 Brno		77 381		
Záloha na UK 2025 od UEA		1 091 878		
Příjmy celkem	162 000	2 134 445	132 000	
Výdaje	pl.2025	sk.2025	pl.2026	
Starto tisk	24 000	28 573	26 800	
Starto distribuce	17 000	20 101	20 000	
Konference a sjezdy	54 300	91 771	80 000	
Činnost klubů a sekcí bez PS	5 000	0	4 000	
Provoz ČES, internetové služby	11 000	16 742	2 500	
Jízdné funkcionáři	4 000	1 838	3 000	
Přísp. na stravné za schůze	1 000	511	700	
Muzeum	15 000	4 174	4 000	
Libroservo nákup zboží	10 000	75 256	6 000	
Libroservo poštovné a balné	300	0	300	
Kurzy esperanta	300	0	200	
Příspěvky UEA ind. běžný rok		42 756		
Příspěvky UEA ind. bud. rok		0		
Platby UK v běžném roce		155 893		
Platby UK na budoucí rok		0		
Platby ILEI a pedagog. komise		604		
Kolektivní členství v UEA	1 500	1 206	1 500	
Kolektivní členství v EEU	1 300	0	1 300	
Blahopřání, kondolence	2 000	5 708	3 000	
Poplatky		0		
Daň z úroku	3 800	3 193	3 000	
Nový majetek	10 000	36 645	13 000	
Půjčka		105 000		
UK 2025 Brno		1 460 216		
Předplatné časopisů		1 733		
Výdaje celkem	160 500	2 051 920	169 300	

Vážení členové,

v aktuálním čísle STARTA přinášíme tabulku s výsledkem hospodaření za minulý rok a plán na tento rok. Z opatrnosti každoročně plánujeme schodkový rozpočet, přitom skutečný účetní výsledek za roky 2023 i 2024 byl kladný. V roce 2024 skončilo naše hospodaření s přebytkem 97 667,- Kč, kdy ale polovinu tvořily příspěvky za individuální členství UEA. Rada členů využila možnosti hradit tyto příspěvky prostřednictvím ČES a zajistit si tak nižší kongresový poplatek na UK v Brně. Po dohodě s UEA jsme tyto příspěvky neodvedli na konto UEA, ale použili je na úhradu služeb spojených s pořádáním kongresu v Brně. Tyto výdaje jsme měli až v roce 2025 a proto výsledek v roce 2024, kde byly jen příjmy, vypadá tak skvěle. Příjmy i výdaje v roce 2025 jsou téměř desetinásobné oproti minulým letům. ČES byl v tomto roce příjemcem dotací a darů od města Brna i České pošty na realizaci UK 2025, s jehož pořádáním nám ale vznikly i náklady. V souvislosti s pořádáním UK a po dohodě s UEA jsme hradili i některé jejich závazky v českých korunách a UEA nám poskytla na jejich úhradu zálohu. Mnohonásobně oproti předchozím letům se zvýšily jak pohledávky za UEA, tak i naše závazky k UEA. Doufejme, že UEA bude schopná odsouhlasit vzájemné vyúčtování v tomto roce. Co výrazně přispělo ke kladnému výsledku roku 2025 je LIBROSERVO, kdy oproti skutečným výdajům 75 256,- Kč je příjem 120 041,- Kč. V této položce je totiž zahrnut obrat s reklamními předměty v našem butiku v průběhu UK Brno. Ještě jednou chci tady poděkovat členům LKK, kteří se podíleli

na zajištění těchto předmětů i jejich prodeji v butiku. Bohužel s tímto příjmem v LIBROSERVU nelze v letech, kdy nepořádáme UK, počítat. Rozsah STARTA neumožňuje podrobnou analýzu našeho hospodaření. Detailnější materiál připravuje každoročně pokladní Andrea Švubová s pomocí čestného pokladníka Vráti Hirše a prezentuje ho na našich podzimních kongresech / konferencích, kde máte také možnost se ptát na podrobnosti.

Jiří Tomeček, předseda

Co dělá výbor

Výbor se sešel virtuálně 19. února, 27. března a 24. dubna, aby projednal několik bodů:

- Tabulku svazového hospodaření
- Strukturu svazového archivu na Google-disku
- Cenu on-line kurzů (vede M. Kolka)
- Projednat systém půjčování knih po rekonstrukci muzea
- Smlouvu s muzeem Č. Třebová o zapůjčení Zamenhofovy busty
- Příhlašku a program německo-českého setkání v Olomouci, ubytování, jednací místnosti
- Rozeslat včas Ret-komunikoj, aby se lidé mohli do Olomouce přihlásit
- Movada Foiro v Grazu – naše účast
- Konference v Poděbradech, připravit článek do Starta a přihlašku
- Příprava konference v roce 2027, snad Valtice
- Fotky na svazovém webu, autorská práva, GDPR

mm

SABLA PRINTEMPO

La lastjare renovigita seminario en Písek, denove pri la E-literaturo en la 21-a jarcento, okazis la 11-an de aprilo en Písek kaj bonvenigis interesatojn el 5 regionoj.

En la Urba Biblioteko oni medite partumis 12 brilajn ideojn por legi librojn kaj sinsekve siajn ŝatatajn librojn en Esperanto. Ekz. Lucie Karešová parolis pri „Kredu min, sinjorino“ de C. Rosssetti, Jitka Kubíková pri la biografio de Bertha von Suttner aŭ Miloš Bloudek pri „Neŭtrale“ de S. Johansson. Květa Krajičková surprize alportis „Gastronomian vortaron“ kaj malkovris sian hobion pri kolektado de kuirlibroj.



Post la tagmanĝo „U Reinerů“, kie longe vivis la fama poeto A. Hejduk, kaj vizito de la Ŝtonponto, oni en du grupetoj vizitis la burĝan kaj maltejan areojn kaj inaŭguris la kluban bibliotekon kaj arkivon de la EK „La Ponto“ en la str. Karlova 8 (pri ĝi en la sekva numero).

Posttagmeze en la hobiĝardenista prelegejo i.a. Petr Chrdle rakontis pri siaj spertoj pri verkado de libroj kaj malkovris siajn nunajn planojn, Vladimír Türk parolis pri specifeco de kontrolado de Esperanto-tradukoj kaj Pavla Dvořáková prezentis novan retan revuon [Literatura Vivo](#), el kies lasta numero oni legis du kortuŝajn poemojn. Ne mankis deklama ĝuo de poemoj en la ĉeĥa kaj en

la traduko (A. Sova, J. Seifert), utiligaj klarigoj de Miloš Bloudek pri bitlegiloj, komuna kantado k.a. La aranĝo okazos denove sekvontjare la 3-an de aprilo 2027. - padv-

LIGVA SEMINARIO EN PACOV

En la agrabla kaj kvieta montetara urbeto [Pacov](#) okazis ekde la 15-a de aprilo 2026 kvartaga „seminario Skokovy“. Eĉ la medio de la Turista hotelo estis por partoprenantoj simila, same kiel la etoso, programo kaj prezo. Venis kaj la restadon ĝuis entute 17 esperantaj fervoruloj, dank' al organiza oferemo de Milada Zemanová.

La instruado okazis sub gvido de Jindřiška Drahotová kaj Jarka Malá. Posttagmeze interesatoj povis viziti vidindaĵojn de la urbeto kaj muzean ekspozicion en la kastelo. Dum la promeno oni malkovris la tombon de la loka naskiĝinto poeto [Antonín Sova](#) kaj eksciis interesaĵojn pri lia vivo kaj ekkonis la lokan Esperanto-pioniron [Hugo Jokl](#) (kiu instruadis en Vieno kaj estris Boheman E-klubon).

La pinta programa vespera estis rakontado „Interesaj travivaĵoj en ekster-eŭropaj landoj“ de Petro Chrdle, kiu ne forgesis alporti siajn nove eldonitajn librojn. Alivespere kun Pavla Dvořáková oni trejniis sian voĉon, ĝuis deklamadon de belsonaj poemoj, tradukis inspirajn saĝaĵojn pri esenco de feliĉo kaj abunde kune kantis. Ĉiuj seminariuloj estis tre iniciatemaj, viglaj kaj kun spritaj ideoj.

La medio povus servi por paroligi pli junajn adeptojn, ĉar aŭtune tre verŝajne la partoprenantoj atendas daŭrigi la tradicion - ĉu denove en Pacov, ĉu event. aliloke.

-jidr-, -padv-

UEA SUBTENAS DONACKAMPANJON DE TEJO

Post plurjara ricevo de la administra subvencio de la programo Erasmus+ ĉi-jare TEJO estis informita, ke ĝi ne povos ricevi la subvencion por 2026.

Danke al sia oficistaro kaj aktivularo TEJO sukcesis realigi gravajn iniciatojn por la junulara Esperanto-movado, interalie kulturajn projektojn, internaciajn eventojn, kunlaborojn kun eksteraj institucioj, renovigon de Pasporta Servo kaj profesiigon de sia komunikado.

Nun, por fronti la nunan situacion kaj certigi stabilan funkciadon ĝis 2027, TEJO celas kolekti 25 000 eŭrojn per internacia donackampanjo, kiun UEA subtenas.

Por UEA la fortigo de TEJO estas strategia prioritato.

<https://www.tejo.org/donackampanjo>.

Konciza kurso pri esperanta lingvistiko

okazos inter la 18-22a de aŭgusto 2026 en la Kultura Centro Esperantista (KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando) kiu daŭros poste rete. Ĝi traktos tiklajn problemojn de la esperanta gramatiko de fonetiko, tra morfologio, sintakso ĝis leksikologio kaj pragmatiko.

Se vi interesiĝas, bonvolu kontakti prof. Ilona Koutny (gvidintino de la Interlingvistikaj Studoj de Universitato Adam Mickiewicz, Poznano, Pollando).
koutny.ilona@gmail.com

Aliĝilo:
<https://kulturservo.esperantio.net/form/esperanta-lingvistiko>

Stanislav Kamarýt

Antaŭ 70 jaroj forpasis Stanislav Kamarýt (10.11.1883 – 30.7.1956), pri kiu diras antaŭparolo de lia Historio: ekde la komenco de la Esperanto-



movado en tiu ĉi lando ĝis nun ne aperis en ĝi viro de simila signifo.

Li naskiĝis en la sud-bohemia Velešín, kie vivis pluraj gravaj Kamarýtoj. Li fariĝis doktoro pri filozofio kaj laboris kiel direktoro de gimnazioj en Bratislava kaj Chotěboř.

En la jaro 1900 li ellernis Esperanton kaj jam en 1921 li estis prezidanto de la Universala Kongreso en Praha.

Li estis sekretario kaj poste prezidanto de Bohema Asocio Esperantista, poste vicprezidanto kaj prezidanto de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

Li kunredaktis gazetojn Bohema Esperantisto, La Progreso, Ĉeĥoslovakana Antologion (1935, kun Otto Ginz), post 1945 li redaktis gazeton Esperantista.

El liaj verkoj plej gravas **Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio** (aperis postmorte en 1983), **Filozofia vortaro** (1933) kaj ĉeĥlingvaj **Mezinárodní jazyk** (Internacia lingvo, 1921), **O dvojí pravdě** (Pri du veroj, 1920) kaj **O jednoznačnosti mravního soudu** (pri unusenceco de morala juĝo, 1926).

Konserviĝis 25 liaj artikoloj kaj 20 liaj tradukoj, precipe en Ĉeĥoslovaka Antologio. El lia traduko **Ankoraŭ hodiaŭ subiras la suno super Atlantido** (Vítězslav Nezval) konserviĝis nur fragmento en ZČSEV 25/1967 (disponigis la vidvino en Hradec Králové).

mm

Marcipana Pasko



Dimanĉe la 29-an de marto 2026 okazis jam la 5-a Marcipana Pasko en la Esperanto-muzeo en Svitavy. La unuan ni organizis en la jaro 2022. Tiam venis en la muzeon 70 infanoj por modli. Poste – krom la jaro 2024 – la partopreno de infanoj havis tendencon malkreski. Ĉi-jare venis nur 33 infanoj, kiuj kreis 43 leporojn kaj anasojn el marcipano. Ĉar la Urba Muzeo proponis multajn aliajn metiejojn, en nian muzeon infanoj poste ne venis. Tial ni interkonsentis, ke la venonta Marcipana Pasko efektiviĝos en la Urba Muzeo, por ke ĉio estu samloke. Marcipana Kristnasko restos en nia Esperanto-muzeo.

Libuše Dvořáková

Turistoj en Esperanto-muzeo

Svitavy la 21-an de marto 2026 iĝis urbo de turistoj. Ili alveturis el vasta ĉirkaŭaĵo kaj eĉ el civitoj ekster la regiono Pardubice, por oficiale malfermi la turisman sezonon. Eĉ Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy por pli ol du centoj da ili preparis interesan prezent-

adon, kiu komenciĝis per speciala Turisma Informa Signo antaŭ la Otten-dorfer-domo kaj per verda instrua pado „L. L. Zamenhof“. Poste la turistoj senhezite ekcelis al la Esperanto-muzeo. La instrua pado kondukis preter paneloj kun bazoj de gramatiko trans historio de Esperanto kaj kongresoj ĝis ĝia nuntempa disvastiĝo en la mondo kaj praktika aplikado. Ĉe unu haltejo la turistoj konatiĝis ankaŭ kun konkreta agado de la klubo kaj multspecaj interesoj de ĝiaj membroj.



La tuta instrua pado estis akompanata per informplena kaj atentokapta klarigado fare de la kluba prezidantino s-ino Dvořáková. La interesan lokon ĝis nun ne konis vizitantoj el Chrudim, Hlinsko aŭ Náchod, kaj la amplekso de kolektoj kaj tutmonda signifo de la unika muzeo surprizis ankaŭ multajn lokajn loĝantojn. Kun bela travivaĵo kaj novaj informoj multaj turistoj forportis hejmen ankaŭ turistajn vizitkartojn, magnetajn bildojn, bildkartojn kaj aliajn materialojn kaj certe ili dum siaj promenoj denove revenos al Svitavy.

M. Sýkora

Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy

Nova ekspozicio

inaŭguro 20 junio 2026 ekde la 9-a horo

Universalaj Kongresoj de Esperanto en Ĉeĥoslovakio, Slovakio kaj Ĉeĥio en Esperanto-muzeo Svitavy

Programo: UK-oj (L. Dvořáková), IFEF-kongresoj (L. Kovář), UK Brno (J. Tomeček), Martin Stupnik (P. Chrdle), Botanikaj ĝardenoj Brno (O.A.Fischer), Ŝkarvan kaj Esperanto (P. Baláž).

Jarkunveno de EK Svitavy



Sabate la 21-an de februaro 2026 kunvenis en la Esperanto-muzeo membroj de la loka Esperanto-klubo kaj tri gastoj (L. Kovář, O. A. Fischer, M. Malovec) – sume 18 personoj.

La klubo zorgas pri la muzeo, por ke ĝi restu ĉiam vivanta loko, en kiu havas oficialan sidejon nia asocio. Tial la klubo estas por ni tre grava.

La kunvenon gvidis Miroslav Sýkora. Post tralego de kutimaj raportoj pri la agado kaj mastrumado, estis prezentita plano de agado en la jaro 2026, kiu estas vere riĉa. L. Kovář parolis pri IFEF kaj O.A.Fischer pri siaj libroj.

La teksto pri la agado estis projekciata sur ekranon kaj diskutata.



La **agadplano** enhavis jenajn punktojn:

- Grupigado de interesiĝantoj pri la internacia lingvo en la regiono Svitavy
- Altigado de lingva nivelo de la membroj
- Disvastigado de scioj pri la historio kaj nuntempo de la E-movado ĉe la klubanoj
- Disvastigado de Esperanto-literaturo kaj de propagandaj materialoj
- Projektoj por kreskigi la membrobazon
- Aktiva laboro kun junularo kaj junularaj organizoj (ekz. skoltroj)

Konkretaj aranĝoj:

- Prelegoj pri Tonga kaj Samoa, pri petveturado tra Eŭropo, pri Uzbekistano
- Marcipana Pasko (29.3.), Marcipana Kristnasko (6.12), Kreado de Gratulaĵoj (29.11.)
- Internacia Infana Kanto (19.6.)
- Inaŭguro de nova ekspozicio „Universalaj Kongresoj en Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥio kaj Slovakio“ (20.6.)
- Ekkona ekskurso al montaro *Kašperské hory* kaj ĉirkaŭaĵo
- Vizito al senioroj en la urbo Polička kaj invito de Asocio de Ĉeĥaj Turistoj
- Strebo pri eldono de du poŝtmarkoj kun esperantista temo

mm

Senperforta komunikado – vojo al pli bonaj rilatoj

Senperforta komunikado (plue SPK, ĉeĥe nenásilná komunikace, angle non-violent communication) estas aliro al komunikado, kiu fokusiĝas al esprimo de niaj bezonoj kaj sentoj per la maniero, kiu ne vundas aliajn homojn kaj samtempe respektas nin mem. Tiun koncepton evoluigis usona psikologo Marshall Rosenberg en la 70aj jaroj de la 20a jarcento. La baza ideo estas, ke ĉiuj konfliktoj ekestas, kiam homoj ne havas plenigitajn siajn bazajn bezonojn – kiel sekureco, kompreno, respekto aŭ aŭtonomio. SPK instruas nin, kiel esprimi tiujn bezonojn klare kaj kun empatio sen kulpigado de aliaj aŭ sen manipulado de ili.

Tradiciaj manieroj de komunikado ofte inkluzivas kritikon, juĝon (posuzování) aŭ minacojn. Tamen SPK estas bazata sur kvar fundamentaj ŝtupoj: observado (kio vere okazis), sentoj (kion ni sentas), bezonoj (kio mankas al ni) kaj peto (kion ni specife deziras).

1. Observado sen juĝo

La unua ŝtupo estas objektivite priskribi la situacion sen prijuĝo. Anstataŭ diri “Vi estas malordema kaj vi neniam ordigas viajn aĵojn” ni diros “Hieraŭ mi vidis ŝuojn en loĝĉambro kaj teleron sur la tablo.”

2. Esprimo de sentoj


La dua ŝtupo estas sincere esprimi niajn emociojn. Anstataŭ “Tio kolerigis min” ni povas diri “Mi sentas min frustrata” aŭ “Mi estas seniluziigita.” Gravas paroli pri niaj sentoj, kaj ne taksu la alian personon.

3. Identigado de bezonoj

La tria ŝtupo estas kompreni, kia bezono elvokis nian senton. Ofte ni ne rimarkas, kio vere mankas al ni. Se ni estas frustrataj de malordigo, la bezono povas esti ekzemple ordigo, harmonio en nia loĝado aŭ sento ke alia persono zorgas pri ni.

4. Klara peto

La lasta ŝtupo estas formuli konkretan peton, kiun alia persono povas plenumi. Anstataŭ malklaraĵaj postuloj ni diras “Ĉu vi povus meti viajn ŝuojn al la koridoro kaj la teleron en la telerlavilon?”



Ekzemplo 1 - konflikto en familio

Sen SPK: “Vi neniam helpas al mi kun nia mastrumado! Vi estas pigra kaj egoisma. Mi faras ĉion kaj vi nur pigras.”

Kun SPK: “Kiam mi vidas, ke teleroj restas en lavkuvo kaj vestaĵoj por lavi amasiĝas, mi sentas min elĉerpita kaj sola. Mi bezonas senti, ke mi povas fidi vin kaj ke ni zorgas pri nia mastrumado kune. Ĉu vi povus lavi la telerojn post la vespermanĝo kaj unufoje semajne zorgi pri lavado de vestaĵoj?”

Diferenco: la dua versio ne kulpigas, sed klare esprimas, kion ni sentas kaj kion ni bezonas.

Ekzemplo 2 - konflikto en laborloko

Sen SPK: “Via propono en la kunveno estis absolute idiota. Vi ne devis esti tie kaj vi nur malfruigis nin.”

Kun SPK: “Dum hodiaŭa kunveno, kiam vi ekparolis al la temo, kiu ne estis sur la programo, mi sentis min misdistrita kaj maltrankviligita. Mi bezonas, ke niaj kunvenoj kuru laŭ la plano, por ke ni estu efikaj. Ĉu vi povus sendi viajn demandojn al aliaj temoj per retmesaĝo aŭ demandi dum la venonta kunveno?”

Diferenco: la kritiko ŝanĝiĝas al konstruktiva retroefiko, kiu ne atakas la alian personon.

Ekzemplo 3 - konflikto inter amikoj

Sen SPK: “Mi neniam povas fidi vin. Vi denove ne alvenis al nia renkonto sen iu ajn mesaĝo. Vi ne estimas nian amikecon.”

Kun SPK: “Kiam vi ne alvenis hieraŭ al nia renkonto sen sciigi min, mi sentis min seniluziigita kaj vundita. Mi havas bezonon scii, ke vi estimas nian tempon kaj ke mi povas fidi vin. Ĉu vi povus sendi al mi mesaĝon, kiam viaj planoj ŝanĝiĝos, kiel eble plej frue?”

Diferenco: anstataŭ atako al personeco ni celas la specifan konduton kaj ni esprimas niajn sentojn.

Avantaĝoj de senperforta komunikado

■ **Malaltigas konfliktojn:** Kiam ni esprimiĝas sen kulpigado, la alia persono defendas sin malpli kaj pli bone aŭskultas nin.

■ **Konstruas interkompreniĝon:** Empatia esprimo de niaj bezonoj helpas al aliaj kompreni, kion ni vere celis.

■ **Plibonigas rilatojn:** Malferma kaj sincera komunikado kreas pli profundan konekton inter homoj.

■ **Solvas problemojn pli efike:** Kiam ni scias, kion la alia persono vere bezonas, ni povas pli bone serĉi solvojn, kiuj taŭgas al ambaŭ flankoj.

Oni ne lernas SPK-on dum unu nokto. Ĝi postulas paciencon kaj praktikadon. Vi povas komenci per tio, ke vi ekkonscias viajn sentojn kaj bezonojn en kutimaj situacioj. Kiam vi sentas frustratajn aŭ kolerigitajn haltu kaj demandu vin: “Kion mi sentas? Kio mankas al mi?” Poste strebu esprimi vian bezonon al la alia persono sen kritiko. Ju pli ofte vi uzos ĉi-tiun metodon, des pli sukcesa vi estos kun ĝi.

SPK ne estas nur tekniko por solvo de konfliktoj – ĝi estas ankaŭ aliro al vivo, kiu subtenas interkompreniĝon, empatiajn kaj respekton. En la mondo, kie ni ofte renkontas agresemon kaj miskomprenon, SPK povas esti forta ilo por konstruado de pli harmoniaj rilatoj en niaj familioj, laborejo kaj en la tuta socio. Kiam ni lernos esprimi niajn bezonojn sen atako kaj percepti bezonojn de aliaj, ni malfermas vojon al pli profunda kompreniĝo kaj reala paco.

La ĉeĥan tekston kreis larĝa lingva modelo (alinome artefarita inteligenteco) Claude Haiku 4.5 @ duck.ai per ĉi tiu postulo:

“Napiš článek o nenásilné komunikaci pro širokou veřejnost. Vysvětli, co to je a uveď několik praktických příkladů.”

Faktan ĝustecon kontrolis kaj mane esperantigis Mgr. Josef Kalčík

Pliaj fontoj pri konfliktsolvo (ĉeĥlingvaj):

[Slyšet se jinak](#). O semináři [Nenásilné komunikace](#) dokumento de Ĉeĥa Radio Vltava 2017 (45 min.)

Část konfliktů [nelze vyřešit](#). Musíme přijmout, že [dokonalého partnera nenajdeme](#) dokumento de Ĉeĥa Radio Wave 2025 (29 min.)

-jk-

Por iom distri

Komparon de ĉeĥaj kaj esperantaj frazeologiaj esprimoj el la libro *La edzino de l' tempvojaĝanto* preparis Mirka Tomečková. **Ne temas pri precizaj tradukoj**, sed kion ŝi vere trovis en la du libroj.

(*daŭrigo de la pasinta numero*)

Nakládat zeleninu pekli legomojn
Pískomil ronĝuko
Prach víří polvo flosas
Potápěčský zvon mergokloŝo
Dokud jsem na něho nevyjela ĝis mi albojas lin
Křečovitě se chvělo konvulsias
Jako kdyby na ni sestoupil Duch svatý kvazaŭ ŝi ricevus revelacion
Bodovka spotlumigilo
Učí se otevírat zámky ŝi lernas perforti serurojn
Podstavec slabo
Závěsy ŝutroj
Vyklop to elkraĉu ĝin
Zdědila to po mně miaj genoj efikas ĉe ŝi
Povahu má... laŭ la personeco
Plodová voda amnia fluido
Praskla amnio kreas
Kůže slunečních paprsků trapezo da sunlumo
ŝel ke mně s děvčaty v závěsu... kun knabinoj reformataj
Mlátime prazdnou slámu ni pelas tagojn sen afero
Přestali na to myslet forpuŝas ĵusan penson
...byste na mne seděli jako štenice, abych svolila vyzkoušet... kiel koŝmaro, vi komencus gurdi al mi, ke mi lasu vin elprovi...
Posekaná mýtina stoplo
šerpa skapolo
Nejsem ve své kůži sentas la pezon de ĉiu minuto
Padám hlady, kanibalismus není tak zavrženihodný migras, hungras kaj pripensas kanibali

Zmačkali kelímky premplatigas
Roztrhl obal ŝiras malferma la pakon
Napověz donu al mi indikon
Nezlob estu brava
Aby nepopraskala kůže ke ne fendetiĝu
Potvoro! Mrcho vulpino malfeino
Dala jsem se trochu do pořádku igis min pli malpli prezentebla
Bušila na dveře martelas pordon
Stáhl jsem se do sebe mi buliĝis en min mem
V létě jsem jen tak bloumala mi pasigis someron nenifareme
Markýza (stínidlo) Persieno
Nařikání, lamentování jeremiado
S někým si mne spletl li prenis min por iu alia
Co zajít ke mně? Ču ni iru ĉe min?
Proklestil jsem jí cestu davem Mi paŝtistas ŝin tra la homamaso
Program (v divadle) libreto
Uvelebili jsme se ni komfortigis nin
Přehodil jsem kabát přes křeslo mi drapiris
Lézt nadřízeným do prdele kisi postajon
Jdi do háje al nerevenejo
Všechno je špatně ĉio iras merden
Vpadly do kuchyně ili enpafas en...
Leknutím jsem se probudila Mi tuj ŝaltiĝas en vekitan staton
Sakra tvrdě zaplatit pipre pagi por ĉio
Bilancuji mi realigis inventaron
Vlasy nepořádně rozhozené ventumile disĵetitaj
Bloumáme ni amblas
Prokličkovali jsme ni ondumas
Vyřezávaný stůlek ĉizita bufedo
Andulka ambirdo
Všimla si mého pohledu kaptis mian rigardon ĉe la freŝa faro
Ohmatal esploris permane
Lelkovat paŝumi
Ramínko vestarko
Vodil ji za nos tenis ŝin sensciencia
Imunita v hajzlu imunsistemo estas tute ruina
Spoušť ellasilo

Cucflek suĉmarko
Procedil mezi zat'atými zuby elpremas tra
 kunpremitaj dentoj
Jsem vyřízenej Estas eks pri mi
 Ručnice alumeta fusilo
Chmýří na bradě ekstoplo de barboj
Ruce v bok manoj sur ka koksoj
 Kreveta salikoko
Jsem chcípák a nemám na světě co
pohledávat mi estas stumpulo kaj mi ne
 deĵoras ĉi tie
 Osika brusonetio
Podřadný pajzl repuŝa noktoklubo
Předměstská panička antaŭurba matrono
Nesnášela, když ji někdo opravoval ŝi
 malamas malpravi pri io ajn
Máš ukvapené závěry vi bazas vian
 konkludon sur misaj datumoj
Jednohubka mordajeto
 Dresink trempsaŭco
Brambůrky terpomflokaj
 Nalíčit rty dabi la lipojn per ruĵo
Mrcha líná bradipo
Jako velká voda kiel kamikazaj
 ĉasaviadiloj
Podmanivý hlas fabela karamela voĉo
 Ostýchavý timida
Nezkrotná dvojka nedresebla duopo
 Placatka platbotelo
Po té vodce se ti zkroutí uši... ĝi kreskigos
 la brustoharojn
Čas vypršel. Hra skončila. Labutí píseň.
 Venis fino al mia latino. Jam temp' está.
 Fino de partio.
Nevnímám hlad, ani otupělost Mi estas
 trans malsato, trans vantaĵoj
Smrt rychlá a jednoznačná senambigua
Zachraňuji, hraji si na tvrd'áka mi
 skabenas
Máš někoho? Ĉu vi frekventas iun?
 Nastartovat kluĉi rapidumon
 Obecně vžitá averaĝa
 Na výletě si užívá vody plaĝumantaj
 Komiks bildstrioj
 Oči přivykly post alĝustigo de okuloj

Alfa.vortaro.net


La Unua Libro kiel Sankta Libro de afrika sekto

Italino Tiziana Bianchi demandis nin anglalingve pri interesa afero:

Ŝi aĉetis libron en itala lingvo kaj en ĝi ŝi trovis informon pri afrika sekto, kiu uzas raran libron kiel rimedon por atingi trancon kaj kuniĝi kun spiritoj. La sekto jam venis ankaŭ en Eŭropon, konkrete en Francion.

Ŝi komencis esplori la situacion kaj malkovris, ke la rara verko estas la Unua Libro de Doktoro Esperanto el la jaro 1887. Kvankam ĉiu esperantisto scias pri ĝi kaj vidis skanaĵon aŭ represaĵon, nur malmultaj vidis la originalon, ĉar konserviĝis nur kelkaj ekzempleroj.

La libro ne havas religian karakteron, sed pro sia internaciismo ĝi akiris mistikan forton, almenaŭ pro tiuj sektanoj.



D-ino Bianchi eĉ verkis 5-paĝan artikolon pri siaj esploroj, sed en Starto ne estas spaco.

AŬSTRIO AGNOSKAS ESPERANTON KIEL LINGVON DE KULTURO KAJ NEMATERIAN HEREDAĴON

La Aŭstra Komisiono de UNESKO formale agnoskis Esperanton kiel parton de la nemateria kultura heredaĵo de Aŭstrio. La oficiala [anonco](#) aperis la 16-an de aprilo 2026, kompreneble en la germana lingvo, sed jen estas traduko:

Buŝe Transdonitaj Tradicioj kaj Formoj de Esprimo

Esperantokultur in Österreich / Esperantokulturo en Aŭstrio (tutlande):

Esperanto estas arta lingvo evoluigita en 1887 de Ludoviko Zamenhof por provizi al homoj tutmonde neŭtralan kaj facile lerneblan lingvon por kompreniĝo kaj paco. En Aŭstrio, aktiva komunumo dediĉita al konservado de ĉi tiu kulturo ekzistas jam pli ol 120 jarojn. Ili regule kunvenas por lingvokursoj, studsesioj, festivaloj kaj konferencoj. Krome, la komunumo evoluigis rimarkindan verkaron en la kampoj de literaturo, muziko kaj prezentartoj.

Por la Vicprezidanto de UEA, Seán Ó Riain, estrarano i.a. por Eksteraj Rilatoj, tio estas “brila novaĵo, kiu tute kongruas kun la strategio AKIRI de UEA por la Esperanto-movado – kaj nur kelkajn monatojn antaŭ la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Graco”. Post Pollando (2014) kaj Kroatio (2019) Aŭstrio estas la tria lando, kiu faris ĉi tiun paŝon, kiu estas esence grava pro pluraj kialoj.

Laŭ Ó Riain “unu el la ĉefaj antaŭjuĝoj de kontraŭuloj de Esperanto estas, ke ‘ĝi ne havas kulturon’. Ĉi tiu formala agnosko de la kultureco de Esperanto fare de tri landoj nuligas ĉi tiun antaŭjuĝon. La Eŭropa Komisiono agnoskis tion, kun praktikaj sekvoj. Ĝi nun subtenos Esperanton same kiel ĝi subtenas aliajn neoficialajn lingvojn, kiel ekzemple la katalunan, la eŭskan, la bretonan ktp”.

UEA dankas ĉiujn aŭstrajn kaj ne-aŭstrajn samideanojn, kiuj kontribuis al ĉi tiu frapa sukceso, kiun la Asocio akompanis kaj subtenis dum la tuta procezo. La Estraro de UEA esperas, ke tio stimulos esperantistojn en aliaj landoj klopodi atingi similan nacian agnoskon, precipe en najbaraj landoj kiel Litovio, Hungario kaj Italio, sed ankaŭ alikontinente. “Kiu lando donos nian sekvan sukceson? Ek al laboro!”, invitas Ó Riain.

Speciala momento pro tiu agnosko okazos en la 111-a UK. Por aliĝi aliru <https://uk.esperanto.net>.

Gazetara komuniko de UEA N-ro 1291

Rimarkigo:

La tri aliaj aŭstriaĵaj agnoskoj estis:

- La Pinzgauaj Legendoj (Salzburg)
- Sociaj Praktikoj Uzo kaj disvastigo de Brajlo (tutlande)
- Tradiciaj Metiaj Teknikoj Oraĵistado en Aŭstrio (tutlande)

Dua Bulteno aperis



kaj estas elŝutebla el la retejo de UEA.

<https://uea.org>

Jam aliĝis 946 personoj el 59 landoj, el Ĉeĥio 38 homoj.

Agadon de nia asocio kaj de ĝiaj membroj ni povos prezenti dum la t.n. Movada Foiro.

La kongreso okazos en la tagoj de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026 en la aŭstria urbo Graz (Štýrský Hradec) en historia kongresa centro.

Dum la kongreso okazos ankaŭ KER-ekzamenoj.

Kongresa temo: Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo.

Ankoraŭ eblas aliĝi, peti helpon ĉe

cefdelegito@esperanto.cz

Oficialaj Informoj n-ro 40 de Akademio de Esperanto

Pri la esprimo “tiel nomata”

Tiu vortokombino aperas en du malsamaj uzmanieroj, ambaŭ zamenhofaj, tute kutimaj kaj vaste uzataj de la plej frua Esperanta epoko. Estas utile konscii pri tiuj du uzmanieroj por ĝuste interpreti la frazojn, en kiuj ili aperas.

La unua uzmaniero

En Kopenhago ekzistas strato, kiu havas la strangan nomon “Hüske-strato”. Kial ĝi estas **tiel nomata**, kaj kion tiu nomo signifas? [*Fabeloj de Andersen, trad. Zamenhof, 1916*]

Fidela Johano estis lia plej amata servisto kaj estis **tiel nomata**, ĉar la tutan vivon li estis fidela al sia sinjoro. [*Fratoj Grimm, Elektitaj Fabeloj, trad. Kabe, 1906*]

Kiam ili atingis la “Promenejon”, la **tiel nomatan** restoracion, [...] Ivan komencis spiregadi kiel laca ĉevalo. [*Bulthuis, Idoj de Orfeo, 1923*]


La dua uzmaniero

La infano havas brulumon de la spira kanalo, **tiel nomatan** bronkiton. [*Orzeszkowa, Marta, trad. Zamenhof, 1910*]

La **tiel nomataj** vortoj “fremdaj”, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo. [*Zamenhof, Fundamenta Krestomatio, 1905*]

*Laŭ François Lo Jacomo
Sekretario de la Akademio*

Legajoj XVII




Novaj Legajoj XVII estas libere elŝuteblaj. Kiu volas paperan version, povas ĝin ricevi kontraŭ 100 kronoj de Jindřiška Drahotová

(drahotova@esperanto.cz)

Vizitu retejon Labutí pirka, enskribu „esperanto“, poste pasvorton „vary7“ kaj tuj vi troviĝos en retejo de la klubo en Mladá Boleslav (prizorgas Blanka Hužerová).

Ekspozicio en Opava


Ekspozicio en Landa Arkivo Opava (2025-2026) enhavas ankaŭ Esperanton. La virtualan version vi povas facile elŝuti. La temo estas: **Počtíte si archíválie v cizích jazycích (Ĝuu legadon de arkivaĵoj en fremdaj lingvoj)**.



Esperanton tie reprezentas protokoloj de Regiona Esperanto-Ligo 1930-1934.

Unua Tanzania Esperanto-Safaro

okazos inter la 7-a ĝis la 21-a de junio 2026. La 109-a UK en Aruŝa 2024 spronis la movadon en Tanzanio. La safaro estas samtempe la **Unua Landa Kongreso de Esperanto en Tanzanio**, sed povas veni ankaŭ esperantistoj el la tuta mondo.



La Safaro vojaĝigos la kongresanojn de Daresalamo tra la Nacia Parko Saadani, Ngorongoro, Serengeto, la Esperanto-Mezlernejo en Marambeko al Mũanzo, kie ili kongresos. Eblas elŝuti la Safarobroŝuron kun aliĝilo.



Jarkunveno de Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio

okazis la 13-an de aprilo 2026 en Prago, en la domo Bohemika kun partopreno de 25 membroj. Post kontrolo de plenumado de la pasintjara rezolucio L. Hakl tra legis raporton pri agado kaj mastrumado. Sekvis propono de nova budĝeto (J. Kukla). Pri IFEF parolis A. Švubová, pri terminologio J. Matuška, pri la gazeto Internacia Fervojisto la ĉefredaktoro L. Kovář. Alparolis ankaŭ reprezentantino de FISAIC s-ino J. Šmerhová kaj reprezentanto de OSŽ s-ro O. Šmehlík.

Nov-elektitaj komitatanoj: Andrea Švubová, Anna Abelovská, Jan Kukla, Ivan Potiška, Ladislav Kovář, Ladislav Hakl, rezervulo Olga Káňová. Nova revizoro Jaroslav Chodníček.


Ladislav Hakl fariĝis prezidanto, Ladislav Kovář vicprezidanto, Anna Abelovská sekretariino.

Konferenco ĈZES 5.10.-7.10.2026

se letos uskuteční v hotelu Oddech , který se nachází v Krkonoších na Lučiměch, 3km od Pece pod Sněžkou v nadmořské výšce 1122 m.n.m. Nejbližší železniční stanice je Svoboda n. Úpou, odkud jezdí autobusy do Pece. Odtud pak bude zajištěn návoz účastníků automobilem. Ubytování mají též právo přijet až k hotelu svým vozem, kde zaparkují.

Hotel Oddech*** nabízí celoroční ubytování ve 20 dvouúložkových pokojích s možností 1 přistýlky, dále ve 3 apartmánech až pro 6 osob. Všechny pokoje jsou moderně vybavené, prostorné a pohodlné, s vlastním sociálním zázemím, sprchou, TV-SAT. Samozřejmě je bezbariérový pokoj umístěný v přízemí.

1. Železniční stanice Svoboda n. Úpou
2. Pec pod Sněžkou
3. Hotel Oddech



La aŭtuna konferenco de ĈFEA efektiviĝos en la montara hotelo Oddech en Černý důl (Krkonoše) inter 5.-7. 10. 2026.

(laŭ raporto de A. Abelovská)

Sukcesa juna kursano

Max Kašparů gvidas sukcesan kurson de Esperanto. Lian plej junan kursiston, gimnazianon Štěpán Sedlák, kiu eminentas ankaŭ en lecionoj de la angla kaj rusa kaj interesiĝas pri la hinda, intervjuis loka gazeto ([Zpravodaj](#) Městského úřadu Pelhřimov).



El ideoj de Štěpán: Ĉe lernado de fremdaj lingvoj gravas la motivoj. Se iu ne vidas sencon en la lernado, tiu kompreneble malsukcesos.

Min kondukis al fremdaj lingvoj Esperanto. Entuziasmigis min la ideo, ke ĝi celas kunigi la mondon kaj estas bona bazo por studi aliajn lingvojn. Ĉi tie en Pelhřimov ne parolas Esperanton multaj homoj, sed en la interreto estas granda komunumo, kiu aranĝas kunvenojn en diversaj mondopartoj, eldonas gazetojn kaj fondas organizojn. Ekzistas ankaŭ multaj kristanoj, kiuj parolas Esperanton, tial mi kredas, ke la lernado havas sencon.

Ne helpas nur legi aŭ rigardi videojn. Mi ĉiutage almenaŭ unu horon parolas kun mi mem en fremda lingvo, kiun mi lernas.

Novinky KAVA-PECH



Ĉiujn tri aŭtoris Petr Chrdle ĉeĥlingve, sed pri Esperanto-temoj.

Vuk Echtner: Život pro esperanto, víru bahá'í a nevidomé

Život Vuka Echtnera je příběhem mimořádně nadaného člověka, který navzdory chudobě, životním zvratům i politické perzekuci dokázal všechny své schopnosti zasvětit službě druhým. Prostřednictvím esperanta našel cestu k nevidomým i k víře bahá'í a stal se učitelem, překladatelem a organizátorem, jehož práce ovlivnila mnoho lidí doma i v zahraničí. Jeho osud však poznamenalo i věznění v nejtěžších žalářích 50. let. Přesto si zachoval neobyčejný životní optimismus a vnitřní sílu, s níž pokračoval ve své práci až do konce života. Kniha přináší nejen životopis pozoruhodné osobnosti, ale i svědectví o době, v níž ideály porozumění, humanity a služby druhým nebyly samozřejmostí. Vyjde v květnu

71 s., 197 Kč

Vuk Echtner (1905-1994) estis ĉeĥa esperantisto kaj bahaisto, kiu servis al blinduloj kiel aŭtoro de blindula gazeto Aŭroro. Plie li transskribis per brajla skribo 52 librojn en diversaj lingvoj.

Mluvnice esperanta: Stručně, přehledně, bez zbytečné teorie

Srozumitelný a ucelený výklad mluvnice mezinárodního jazyka esperanto. Díky jeho mimořádné pravidelnosti se obejde bez složité lingvistické terminologie a je přístupný skutečně každému. Publikace provází čtenáře základními principy jazyka přehledně a krok za krokem, s důrazem na pochopení souvislostí spíše než na memorování pouček. Využívá přirozené logiky esperanta a ukazuje, že i mluvnice může být jednoduchá a srozumitelná. Je vhodná jak pro první seznámení s jazykem, tak jako praktická příručka pro jeho studium i opakování.

Vyjde v květnu 39 s., 97 Kč

Gramatiko de Esperanto ĉeĥlingve sen superflua teorio, sen komplika lingvistika terminologio. La publikaĵo akompanas la leganton tra bazaj principoj emfazante komprenon de interlingvostaj anstataŭparkeradon de reguloj.

Světlo porozumění: Komenský – Zamenhof

Rozpracováno. Pracovní názvy kapitol: Úvod – Mimo obsahový průnik (u JAK pedagogika, u LLZ judaismus) – Interlingvistika – Mezináboženské vztahy – Mírové snahy a myšlenky na evropskou integraci – Epilog (odkazy pro současnost).

Vyjde (snad!) ke konci roku 2026

Libro ankoraŭ prilaborata pri komunikado laŭ Komenio kaj laŭ Zamenhof.

Helpi rulseĝulojn

Kara samideanino, kara samideano



Ekde preskaŭ sepdek kvin jaroj, nia franca Esperanto-Kulturdomo posedas kastelon Grésillon por progresigi Esperanton per kursoj kaj aliaj esperantlingvaj renkontoj. Por konservi la ejon kaj adapti ĝin al la postuloj de nia epoko, necesas bontenaj laboroj: pluraj jam efektiviĝis, pluraj estas planataj. La Kulturdomo Greziljono nuntempe povas aŭtonome certigi parton de tiuj konstruejoj, sed povas malfacile lanĉi ĉiujn necesajn laborojn.

Inter la prioritatoj, ni devas al rulseĝaj personoj kun moveco reduktita (PMR) oferti duan adaptitan dormĉambbron kaj lavejon. Tiel nin devigas la leĝoj, sed ankaŭ nia zorgo digne akcepti ĉiujn niaj gastojn sen diskriminacio. Por la elektita projekto en la dormĉambro 34 en la maldekstra kromdomo, financado estas necesa.

Ni lanĉas ĉi tiun **alvokon al donacoj**. Se vi rekonas la gravecon realigi plej rapide tiujn laborojn, kaj se vi pretas subteni nin, bonvolu sendi vian donacon al: **Maison Culturelle de l'Espéranto, 1310 route du Lude - Grésillon, 49150 Baugé-en-Anjou, France** aŭ per iu el la pagomanieroj menciitaj en [nia retejo](#), precizigante kiel pagocelo “donaco PMR”.

Vi povas ankaŭ subteni, akirante societajn partojn B (laŭ la statutoj) kaj partoprenante en niaj agadoj, inkluzive en la laboroj de la volontulaj teamoj.

Kia ajn estos via helpo, la Esperanto-Kulturdomo dankas vin varme.

(foto el Vikipedio)

Maratona E-kursaro Internacia E-Konferenco Grésillon 6 – 15 julio 2026

KURSOJ

- **Ni komencu kune!** Komencantoj kaj komencintoj (A1-A2)
- **Ni daŭrigu kune!** Progresantoj kaj progresintoj (B1-B2) (Frank Lappe)
- **Leksika pliriĉigo kaj diskuto pri aktualaj temoj; Lingvo kaj kulturo ; Interkultura komunikado (C1-C2)** (Koutny Ilona)

IEK-38: Internacia E-Konferenco pri variaj temoj

AKTIVAĴOJ

- **Praktika kurso de Unua Helpo (sukurado)** (Frank Lappe)
- Promenado en la parko por malkovri la lokajn flaŭron kaj faŭnon
- Turismaj vizitoj laŭ nia komuna interesiĝo al: apotekejo Baugé, kastelo Le Lude, dolmeno Pontigné, kastelo Montgeoffroy, ludejo Boule de Fort, artfajraĵo je 07-14 ...
- Libroservo surloke, vidi la liston (libroservo)

Ilona Koutny naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario, ekde 1997 ŝi vivas en Pollando. Ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano ŝi gvidis la Hungaran Katedron kaj internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn.

Frank Lappe estas esperantisto el Frankfurto ĉe Majno kaj partoprenanto de la unujara *Instruista Trejnado* en Poznano pri metodiko de lingvoinstruado.

<http://www.gresillon.org/>

ZAT 2026

Lucca, 11-15 Novembro 2026

Metisemaniario (11-13 Novembro) kaj la tradicia **ZAT** (13-15 Novembro).

<https://zat.kongreso.org>



Iom pri nia programo.

Ni komencos, de merkredo tagmeze ĝis vendredo tagmeze, per Meti-seminario en Esperanto pri **fotado kaj filmfarado**, gvidata de **Ireneusz “Irek” Bobrzak**.

Vendredon posttagmeze kaj la tutan sabaton estos la vico por prelegoj kaj diskutoj: ni planas plurajn interesajn prezentojn, gvidataj de landaj kaj eksterlandaj spertuloj kaj amikoj.

Dimanĉon matene, kiel tradicio, estos la **senaldonpaga ekskurso** al malpli vizitataj kulturaj eroj de la urbo Lucca kaj ni finos per la jam tradiciiĝanta **Festa Zamenhofa Bankedo**.

La konsulejo Pola en Florenco kontribuos al la Aranĝo per festado de la Tago de Pola Sendependiĝo kaj verŝajne paralele al nia aranĝo funkcios ilia speciala lernejo por infanoj de polaj kaj duonpolaj toskanaj familioj.

Por la manĝoj la plano estas ĝin aranĝi en mezepoka salono de la **Historiaj Remparoj de Lucca**.

En la vesperoj estas planataj publikaj koncertoj en grava urba placo, senpage malfermata al la loka publiko.

zat@kongreso.org
tel. +39 329 7463600

Wikipedia 25 jaroj

La interreta enciklopedio Wikipedia estis lanĉita en la jaro 2001. En la sekva jaro 2002 aperis versio esperanta kaj en 2003 la ĉeĥa. Aktuale havas Vikipedio 358 lingvajn versiojn. La plej forta estas la angla (7 milionoj da artikoloj), la ĉeĥa staras sur la 29-a loko (590 mil artikoloj), Esperanto sur la 37-a loko (384 mil artikoloj, 400 kontribuantoj).



WIKIPEDIO
La libera enciklopedio

Plej surpriza estas la cebua lingvo (Filipinoj), kiu staras sur la dua loko (6 milionoj da artikoloj) antaŭ la germana (3 milionoj), franca (2,7 milionoj), sveda (2,6 milionoj), nederlanda (2,2 milionoj), hispana (2,1 milionoj) kaj la rusa (2 milionoj). Pliajn informojn vi trovos ĉe [Wikipedia: Internacia Vikipedio](https://wikimedia.org/).

ILEI-sekcio restarigita

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj havis plurfoje ĉeĥan sekcion, por kiu necesas minimume kvin membroj, kaj plurfoje ĝin restarigis. Nun ĝi restariĝis kun Milan Kolka kiel sekciestro, kiu estas ankaŭ ĉefdelegito de UEA. Estus bone, se ĉiuj, kiuj okupiĝas pri instruado, fariĝu membroj. Ili ricevos kontraŭ 300 Kč kvar numerojn de Internacia Pedagogia Revuo (176 paĝoj sume) kaj helpos al prestiĝo de nia instruado.



ilei@esperanto.cz

Ĉeĥa-germana renkontiĝo en Olomouc

Dum la ĉi-jaraj Pentekostaj ferioj (**la 22a - la 25 majo**) esperantistoj el najbaraj landoj renkontiĝos en Olomouc por komuna evento en la restoracio Fontana. La programo inkluzivas prelegojn, urbotrarigardon, viziton al la Esperanto-Muzeo en Svitavy aŭ viziton al la bestoĝardeno sur la monteto Svatý Kopeček, kaj ankaŭ vingustumadon. La evento ankaŭ inkluzivos la Kongreson de la Germana Esperanto-Asocio (GEA). La kunveno estas planita por la semajnfino kun la ebleco resti ĝis lundo.

Aliĝu al komuna renkontiĝo de ĈEA kaj GEA en Olomouc
komitato@esperanto.cz

Lingva kafejo Trenčín

Lingva kafejo Trenčín sub titolo "**Jednou rečou**" (Per unu lingvo) komencas funkcii merkrede **20.5.2026 je la 17:00-19:00 hod.** en kafejo/restoracio **Perla (Legionárska 49, 911 01 Trenčín)**.

Plano estas organizi ĝin unufoje monate eĉ dum somero. Se vi deziras ekzerci iujn lingvojn (Esperanton aŭ alian) kaj povas veni al Trenčín, vi estas bonvenaj.

Pli da informoj:
<https://www.facebook.com/events/26869645292647571/>
<https://www.trencin2026.eu/podujatie/jednou-recou/>

PS: Persone mi ĝojas, ke kiel E@I kaj esperantistoj ni helpis la projekton startigi.

Peter Baláž

Fervojista gazeto Obzor

la 4-an de majo 2026 en sia numero 9/2026 publikigis intervjuon kun prezidantino IFEF Andrea Švubová sub titolo **Mezinárodní železničářská esperantská fererace (IFEF)**. Ŝi unue klarigas, kio estas Esperanto, kiel sin engaĝas la fervojistoj kaj kiajn taskojn havas la prezidanto de la tutmonda organizo de esperantistoj-fervojistoj.

PŘEDSTAVUJEME • OSOBNOSTI • TVÁŘE OSŮ

Mezinárodní železničářská esperantská federace (IFEF)

mezi mezinárodním rozdílným a různým jazykům a různým kulturám. Nejenom železničářská federace, ale i ostatní profesní organizace, které se zabývají dopravou a logistikou. Jejich úkolem je poskytnout svým členům a spolupracovníkům potřebné informace a podporu. Jejich cílem je vytvořit jednotný svět, který bude prospívat rozvoji a prosperitě celého světa.

OBZOR
www.obzor.org

Konferencos ĉeĥaj fervojistoj- esperantistoj

aŭtune (5 – 7 oktobro) en ripozejo OSŽ Oddech en Černý Důl/Lučiny (Krkonoše – Gigantmontaro).

Kiu volas aliĝi, skribu ĝis la 10-a de junio 2026 al la sekretariino PhDr. Anna Abelovská annaabelovska@seznam.cz

Ne forgesu noti viajn postulojn pri loĝado kaj manĝo.

Loĝado: 5.10./6.10.2026 jes - ne
6.10./7.10.2026 jes - ne

Manĝo: 5.10.2026 vesperm. jes - ne
6.10.2026 tagm. jes - ne
6.10.2026 vesperm. jes - ne
7.10.2026 tagm. jes - ne

JUBILEULOJ DE APRILO, MAJO KAJ JUNIO 2026

Petr Brzoska, Havířov-Horní Suchá

PhDr. Pavla Dvořáková, Písek

Stanislav Franc, Pardubice

Jiří Hanousek, Liberec

Jan Holčapek, Králíky

Eva Husáková, Praha

Ing. Vlastimil Kočvara, Opava

Anna Kubíková, Hranice

Jaroslav Liška, Prostějov

Ing. Irena Papírníková, České
Budějovice

Ing. Zdeněk Pluhař, Praha

Ing. Jiří Pospíšil, Hoštice

Milada Polláková, Rohovládova Bělá

Zdenka Kejlová, Třebíč

Jarmila Šolleová, Žandov u České Lípy

Ing. Břetislav Švidrnoch, Hranice

Alena Kosová, Pelhřimov

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras nur bonajn momentojn en la vivo, sanon, feliĉon, kontenton!

Vlastimil Kočvara – 90

Honora membro de ĈEA kaj iama asocia prezidanto **Vlastimil Kočvara** atingis la 12-an de aprilo 2026 sian 90-jariĝon.




Lia laboro por Esperanto estas sufiĉe konata, li organizis Esperantajn Kulturajn Festivalojn en Opava (1967-1988), prizorgis eldonadon de gravaj verkoj (*Sileziaj kantoj* de Bezruč, *Majo* de Mácha, *Ĉiam malnova kaj ĉiam nova* de Bradatsch kaj serio *Panoramo*), helpis al studentino kun diplomlaboro pri Esperanto, dum lia prezidanteco okazis

UK 1996 Prago. Li laboras ankaŭ en Ĉeĥa Numismatika Societo kaj en kultura societo Matice Slezská, en kies almanakoj aperis liaj artikoloj pri esperantistaj temoj. En 2011 Academia eldonis libron pri kultura agado dum socialismo, por kiu V. Kočvara verkis artikolojn pri E-movado. Sed li kunaŭtoris ankaŭ ĉeĥajn librojn pri Praděd, Odra, Jeseníky, Radegast, pri kant-societo de sileziaj instruistinoj k.a. Li verkis pli ol 400 artikolojn en la ĉeĥa kaj en Esperanto.

Zdeněk Pluhař – 90

Zdeněk Pluhař, honora membro de ĈEA atingas 90-jariĝon la 2-an de majo 2026.



Kiel ĥemiisto li verkis *Ĥemian vortaron* (e-ĉ kaj ĉ-e) kaj multajn artikolojn pri ĥemio, ekz. en la periodaĵoj *Kemio Internacia* kaj *Sano*, en la kajeroj KAEST (plurajn li mem redaktis). Li aŭtoris ankaŭ vortaretojn: ekoturisma, agroĥemia, farmacia, imunoĥemia, kurac-herba, de ĥemia nomenklaturado kaj ĥemia metrologio. Plie li estas la plej grava kontribuanto al la grandaj vortaroj de Kraft kaj Malovec (E-Ĉ kaj Ĉ-E). Li esperantigis ne nur scienfikcian romanon de Ivan Efremov *La nebulozo de Andromeda* (kun Josef Černý), sed ankaŭ *Perrefleksan terapion* de Radka Dvořáková.

Dum multaj jaroj li laboris kiel profesia sekretario de ĈEA, en la estraro de iama scienc-teknika sekcio de ĈEA kaj kiel sekretario de UK 1996 Prago. Poste dum multaj jaroj en la firmao KAVA-PECH. Kunorganizanto de Internaciaj Paroligaj Semajnoj (InPaSem) kaj Ekotur'.

Pontoj inter lingvoj kaj homoj: 75 jaroj de Jozef Reinvart



Josef Reinvart en Brno 2019

En la slovaka kaj internacia esperantista medio apenaŭ necesas memori, ke Jozef Reinvart kaj Esperanto apartenas nedisigeble unu al la alia. Ĉi-jare, en aprilo, ĉi tiu estimata homo kaj nia longjara amiko festas sian 75-an naskiĝdatrevenon – belan jubileon, kiu invitas ne nur al festo, sed ankaŭ al dankema halto ĉe lia vivovojo.

Sur la nacia kaj eŭropa nivelo, kaj ankaŭ tutmonde, li strebas malfermi la esperantan movadon al la neesperanta mondo. Li vidas la estontecon de la movado en la konstruado de kunlaboro kun samideaj kaj valorproksimaj institucioj, kun kiuj la esperanta movado povos pli sukcese realigi la celojn prezentitajn en la “Praga Manifesto”.

Jozef estis kaj restas homo de vizio. Ne fora aŭ neatingebla, sed tia, kiun li kapablis pacience kaj humile transformi en konkretajn agojn. Lia vivo estas pruvo, ke ankaŭ idealoj povas vivi inter ni – se ilin akompanas persistemo, laboremo kaj sincera kredo je la senco de tio, kion ni faras.

Malfacilas diri, kio Jozef estas pli: diplomato, viziulo aŭ sindona esperantisto. Eble ĝuste en tio kuŝas lia escepta eco: ĉiuj ĉi dimensioj en li nature interplektiĝas. Ekde 1997 li dediĉas sin al la demandoj de eŭropa integriĝo, kaj ekde 2004 li aktive partoprenas diskutojn kadre de tutlanda diskuta platformo pri la Eŭropa Unio en Slovakio.

Jozef estas aŭtoro de pluraj fakaj artikoloj kaj tekstoj, en kiuj li okupiĝas pri demandoj de internacia lingva komunikado. Lia verkado estas pripensita, sobra, kaj tamen en ĝi sentebblas persona konvinko kaj profunda intereso pri la homo kaj la socio. Signifan spuron li postlasis ankaŭ kiel aktiva organizanto de aranĝoj, kiuj kunigas homojn trans landoj kaj kulturoj. Li partoprenis diversajn mondajn kongresojn, kunlaboris en la preparado de la 101a Universala Kongreso de Esperanto en Nitro kaj de la konferenco LingvaFest en Bratislavo – renkontiĝoj, kiuj estis ne nur fakaj eventoj, sed ankaŭ spaco por amikeco, inspiro kaj reciproka kompreno.

Ankaŭ hodiaŭ lia voĉo restas trankvila, sed grava. Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo li atentigis per sia artikolo “Lingva egaleco – ŝlosila elemento de eŭropa identeco, solidareco kaj demokratio”, en kiu li konvinke montras la streĉon inter deklarata lingva egaleco kaj la realo. Tiel li malfermas gravan diskuton pri la estonteco de lingva politiko – kiel protekti diversecon kaj samtempe certigi justan pozicion por ĉiuj civitanoj de la Eŭropa Unio.

Julius Hauser

Oldřich Schwetter

1926 – 2016

Antaŭ cent jaroj naskiĝis (7.4.) kaj antaŭ dek jaroj forpasis (2.6.) fondinto de la Esperanto-klubo en Havířov (1958), s-ro Oldřich Schwetter, inter esperantistoj konata ankaŭ kiel biciklisto. Li biciklis ekde sia 11-a jaro kaj trabiciklis 11 ŝtatojn, li ŝatis bicikli eĉ al UKoj, ekz. al la Berlina UK en 1999. Kiel 30-jarulo li kontribuis al junulara bulteno *Tagiĝo* (1958) per rubriko *Esperanto en lernejoj* kaj organizado de sportaj konkuroj.



En Starto aperis liaj artikoloj *Denove mi biciklis* (5-6/1999), *Se vi povas, helpu* (2/2001) kaj *Harakuni en Havířov* (3/2001). Li sciis ankaŭ la germanan lingvon, faris ĉirkaŭ 30 prelegojn en Bohemio kaj Moravio kaj unu en Dresdeno. La klubon en Havířov kunfondis lia edzino Božena Schwetterová.

(fotoj el la muzeo de Svitavy)

Kalocsay kaj Auld

Antaŭ 50 jaroj forpasis **Kalmán Kalocsay** (1891-1976) kaj antaŭ 20 jaroj **William Auld** (1924-2006), du el la plej gravaj kaj plej influaj literaturistoj de Esperantujo.


Ambaŭ verkis kaj originale kaj tradukadis.

El originaloj de Kalocsay estas plej konataj **Rimportretoj** kaj erotikaj **Sekretaj Sonetoj**, el liaj tradukoj ni menciuj dramojn **La tragedio de l'homo** de Imre Madách kaj **Reĝo Lear** de Shakespeare, poemegon **Infero** de Dante kaj poezian tradukon el trideko da lingvoj **Tutmonda sonoro**.



Kun Gaston Waringhien li aŭtoris ankaŭ fakan verkon **La plena analiza gramatiko** (PAG) kaj helpilon por poetoj **Parnasa gvidlibro**.

La ĉefverko de William Auld estas poemlibro **La infana raso**. El liaj tradukoj plej gravas **La mastro de l'ringoj** de Tolkien, **La ĉashundo de la Baskerviloj** de Doyle, de Shakespere **La sonetoj**, dramoj **Epifanio** kaj **Komedio de eraroj** kaj de Oskar Wilde **La graveco de la fideleĝo**.



Tre populara estas lia internacia lernolibro por progresintoj **Paŝoj al plena posedo**.

Hilda Helene DRESEN

1896-1981

naskiĝis antaŭ 130 jaroj kaj forpasis antaŭ 45 jaroj. Ŝi apartenas al plej gravaj literaturistoj de Esperantujo, kiel tradukantino (estona nacia epopo **Kalevipoeg**) kaj ankaŭ aŭtorino (**Vintra luno**, **Norda naturo**).





„Zpíváme ve sto jazycích“
„Ni kantas en cent lingvoj“

Kludzko – 18. června 2026 | Svitavy – 19. června 2026

POZVÁNKA
„Zpíváme ve sto jazycích“
„Ni kantas en cent lingvoj“

dne 19. června 2026 od 10:00 hodin
Svitavy, Ottendorferův dům
svitavy@esperanto.cz

Akce se koná pod záštitou města Svitavy



Vizito el Vieno

En la tagoj 19-a kaj 20-a de aprilo 2026 studis historiajn materialojn en Esperanto-Muzeo studentino el Vieno. Ŝia nomo estas Hannah Szabó. La nomo



sugestas, ke ŝi ne estas denaska aŭstrianino. Ŝia patrino devenas el Budapeŝto kaj vivas en Usono, kie ŝi edziniĝis al Usonano. Hannah en Usono studis ĉe universitato kaj al Vieno ŝi alveturis por plenumi doktoriĝan studadon. Ĉar ŝi dediĉas sin al historio, dum studado ŝi trafis ankaŭ Esperanton kaj komencis ĝin tuj lerni. Kaj materialojn por studado ŝi trovis ĝuste en Esperanto-Muzeo en Svitavy. La urbon ŝi trarigardis mem, ni donacis al ŝi ankaŭ librojn, kiujn ŝi elektis kaj kiujn ni havas en pluraj ekzempleroj. Ni interkonsentis pri plua vizito. Ŝi partoprenos ankaŭ en Universala Kongreso ĉi-jare en la aŭstria Graco.

Libuše Dvořáková

Ni kondolencas

■ La 26-an de marto 2026 forpasis s-ino **Marie Moučková** el Ústí nad Labem en la aĝo de 82 jaroj.



Pioniro de ILEI forlasis nin

La 8an de marto 2026 forpasis Radojica Petrović (Радојица Петровић, 1949-2026), serba matematikisto, komputisto, instruisto kaj esperantisto; Esperanto-instruisto kaj movad-organizanto, estrarano (2001-26) kaj prezidanto (2003-09) de ILEI, organizinto de pluraj konferencoj kaj kongresoj de ILEI kaj de porinstruistaj seminarioj, prezidanto de Serbia Esperanto-Ligo, komitatano A de UEA (1996-2007).



Jorma Ahomäki

(1931-2026)

La 21-an de februaro 2026 forpasis multflanka finnlanda esperantisto, lernejestro kaj rektoro.

Esperanton li eklernis en 1959 de Andreo Cseh. Ekde 1966 ĝis 2009 li instruis Esperanton, ankaŭ dum la Somera Universitato en Turku, poste en diversaj vesperaj kursoj kaj programoj. Post 2009 li lernigis unuopulojn per skajpo. Dum siaj multaj vojaĝoj kaj organizado de prelegoj de eminentaj esperantistoj, plie danke al kunlaboro kun radiostacioj li fariĝis fama internacie.



Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**. Do Zprávy pro příjemce uveďte jméno a příjmení a účel platby (např. **Jan Novák, členství ČES**). Pokud platíte za klub nebo sekci, uveďte své jméno a pošlete seznam za koho platíte na emailovou adresu Andrey Švubové a.svubova@email.cz.

Můžete, ale nemusíte, jako variabilní symbol použít čísla níže uvedená, případně své členské číslo:


- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06946** konference/sjezd ČES
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- Své účty mají KELI a IKUE**
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
č. ú. 123 - 830 734 0217/0100
Komerční banka Poděbrady
- 51100** sekce katol. esp. IKUE
vlastní b. ú. 1647837113/0800

Korespondi deziras

Samideano Georgi Bir sciigis nin, ke lia amikino Tatjana, 50jara kaj bela ĵurnalistino, verkistino kaj pentristino, naskiĝis en Ĉeĥoslovakio kaj komencis relerni la ĉeĥan lingvon. Ŝi deziras trovi iun ĉeĥon por lernado kaj korespondado.

Se vi volas helpi ŝin, skribu al
tbs1877@mail.ru aŭ
georgeword@mail.ru.

Papo Leono la 14-a gratulis al Miloslav Šváček, iamo IKUE-prezidanto, okaze de lia 85-jariĝo



La teksto estas pollingva, ĉar tiajn aferojn en Vatikano prizorgas pola oficisto.

Starto rememorigis laboron de Miloslav Šváček jam en la pasinta numero (p. 26).

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
57. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 300 Kč
Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová, DiS,
svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla:
15.8.2026

--

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 57-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 13 eŭroj, ekster
Eŭropo 15 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.8.2026

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO 2026

2026-05-22/24 Ĉeĥa-germana renkontiĝo en
Olomouc, komitato@esperanto.cz

2026-06-19 Internacia infana kanto, Svitavy

2026-06-20 Inaŭguro de ekspozicio en la E-
Muzeo Svitavy pri UK, svitavy@esperanto.cz

2026-06-21 Renkontiĝo sur la monto Ĉantorio
rondeto@centrum.cz

2026-07-20/30 47-a Renkontiĝo de E-familioj
en *Kaprářův mlýn* kunlabore kun Verdaj
Skoltoj, familioj.mirazeze.org/wiki/REF

2026-08-14/16 Renkonto de ekstendaranoj en
Lančov, let.lancov@seznam.cz

2026-09-25/28 Konferenco de ĈEA en
Poděbrady, komitato@esperanto.cz

2026-10-05/07 Konferenco de fervojistoj en
Krkonoše en hotelo Oddech na Lučinách
annaabelovska@seznam.cz

EKSTERLANDE (Elekto laŭ [Eventa Servo](#))

2026-05-23/30 77-a IFEF-kongreso en Mokra
Gora, Serbio

2026-05-25/02-01 Bibliaj Tagoj en Sankt Goar,
orienta Germanio, Rejnlando-Palatinato

2026-05-29/31 37-aj Esperantaj Tagoj de
Krakovo, Pollando

2026-07-04/11 La 60-aj Baltiaj Esperanto-
Tagoj (BET), Riga, Latvio

2026-07-25/08-01 La 77-a IKUE-Kongreso en
Graz, Aŭstrio

2026-07-19/26 99-a kongreso de SAT en León,
norda Hispanio

2026-07-23/27 Pola E-Kongreso, Bialsko-Biala,
Pollando (landlime kun Ĉeĥio)

2026-08-01/08 111-a Universala Kongreso en
Graz, Aŭstrio, Info: <https://uea.org/kongresoj>

2026-08-08/15 Kristana Kongreso 2026 en
Görlitz, orienta Germanio

2026-08-09/16 82-a Internacia Junulara
Kongreso en Tiana, Katalunio

2026-08-22/29 92-a Itala E-Kongreso, Vico
del Gargano, Foggia, Italio

2026-09-24/28 Beneluxa Kongreso, De Haan

2026-10-18/23 14-a E-Migrado Aŭtuna,
Naundorf, Germanio – landlime kun Ĉeĥio



*Jarkunveno de EK Svitavy en la Esperanto-
muzeo (21.2.2026)*



*Solena prezento de libronovaĵoj
de KAVA-PECH
de Petro Chrdle
en la Unio
de ĉefaj interpretistoj kaj tradukistoj*



*Lingva seminario en Pacov
La 16-an de aprilo 2026*



*Speciala kunveno de Esperantista Klubo en
Prago omaĝe al la vivjubiléo de Viktor Dvořák*



*Inaŭguro de la Biblioteko kaj arkivo de
EK La Ponto kadre de Sabla Printempo*



*Printempa renkontiĝo en Šumperk
la dua en la E-mentala serio "Ludu kun ni"*